

Manfred Hausmann,

La akvofalo

tradukita de Manfred Retzlaff

Blinde sin ĵetas purpur' akvofala
en la abismon tie ĉi.
Kaj disiĝas la ruĝo kaj pala
akvofumo eliĝas el ĝi.

De l' altej' nebulvualo
subeniĝas tie ĉi,
ĝi ruliĝas tra la valo,
de la arboj gutas ĝi.

Glime sur la ŝaŭm' ŝvebanta
estas arko el odor'
kaj la akvo estas bruanta
kvazaŭ tondro en la for'.

El la verdo de l' arbaro
rokoj supren levas sin.
La prafort' de l' vivantaro
bolas jen en la ravin'.

*Traduko de la Germana poemo "Der Wasserfall" de MANFRED HAUSMANN (*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-12.*

Arg-945-1901 (2014-03-19 15:12:32)